

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 13

N-ro 1, 1983

Internacia Pedagogia Revuo – n-ro 1, 1983

Presado: Offset Massarosa, Tel. (0584) 93.090

ENHAVO

Letero de la redaktoro al la legantoj de IPR

El la „Tra la mondo” de Paul Bennemann, Leipzig 1921.

Skribludoj, la „Ludo de l' 15, malfacila transkonduko, ankoraŭ tri ludoj por gajaj kunuloj, diversaj, dancludo.

El „Informilo” 1982 de Bulgara Esperanto Asocio

Rezultoj de la laborgrupo de la ILEI-Konferenco, 111 konsiloj

Amerika Asocio – Bulteno, Januaro 1982

El „Norvega Esperantisto” N-ro 6, 1982

Ellnor Stern: Rajdado kun blinduloj kaj malfortvidantoj

L. Kordylewski: Spertoj pri universitata lektorato de Esperanto

El Koreujo

Germana Esperanto-Instituto / La ekzamena fako raportas

Letero de la redaktoro al la legantoj de IPR

Estimataj gekolegoj,

ni nun estas je la komenco de la jarkolekto n-ro 13. Malgraŭ de sufiĉe oftaj kaj malagrablaj obstakloj IPR sukcesis trifoje jare aperi. Tio estas 36 unuopaj kajeroj kun multaj kontribuoj internaciaj.

Inter diversaj zorgoj la ĉefe premantaj estas

- havigi ĉiam la skriban materialon,
- aperigi ĝin pli ritme kaj
- konstante batali – kaj preskaŭ vane – kontraŭ nekredeblaj eraroj en IPR-kompostajoj faritaj en Edistudio.

La unu sola avantaĝo: la relative favoraj kostoj!

Nun kelkaj vortoj pri IPR/1/1983.

Por tiu ĉi numero mi ricevis nur du rektajn kontribuojn. Unu antaŭ pli longa tempo. Ili estas tiu de Stern kaj tiu de Kordylewski, kiu estas respondanta al Golden: „Normoj kaj celoj de la universitata instruado de Esperanto” en IPR/1/1980.

Stern en „Rajdado kun blinduloj kaj malfortvidantoj” okupiĝas pri interesa aspekto de pedagogio. Rajdado kiel terapio por handikaptitaj gelernantoj ĝis nun ne estis temo pritraktita en Esperanto. Ĉu ankaŭ vi jam kolektis spertojn rilate la temon?

Ĉiuj aliaj enhavaĵoj estas el pluraj fontoj.

La diversajn ludaĵojn mi trovis en tre malnova internacia legolibro de Paul Bennemann el la jaro 1921. Eble vi konas la verkon „Tra la mondo”. Prezentu ilin al viaj infanoj kaj serenigu per ili viajn studhorojn!

Alia „liveranto” estas la Lerneja Informilo de la Bulgara Esperanto-Asocio. Mi elektis raportitan rezulton de la laborgrupo formiĝinta dum la 16a konferenco de ILEI. Ĝi pritraktis varbformojn celantaj infanojn, gepatrojn, gekolegojn kaj politikistojn. Raportis Marin Bacev.

Krome vi povos studi 111 konsilojn por fremdlingva instruado.

El Bulteno 1982 de la lerneja sekcio en Nord-Ameriko mi prezentas al vi pensin-

dajn spertojn faritajn en fremdlingva medio.

En „Norvega Esperanusto”, n-ro 6, 1982 mi uzis el la „Raporto pri la kunveno de la konsilantaro la parton „Edukado”. Ĉiu havas siajn pensojn, spertojn, ideojn kaj proponojn. Kial ili ne skribas por ni ĉiuj en IPR, aŭ kial oni ne venas al niaj konferencoj? Nia sekcio en Koreujo informas en „La espero” pri planita laboro.

La konkludo: IPR prezentas sin en n-ro 1/1983 el pluraj fontoj kaj pravigas per tio sian nomon.

Tamen – tiamamere IPR perdos sian ideon kaj fine sian propran vivon se ĝi kolektas el fremdaj bultenoj, informiloj kaj libroj – ĝi malleviĝus al ĥimero de si mem!

Tian kriplan estajon ni pli bone mortigu kaj la redaktoro ne faru sin maniulo!

Ĝi bezonas freŝan, propran sangon, rektan konstante fluantan materialon el ĉiuj de niaj sekcioj.

Mi deziras fari tiuritate mian alvokan kaj urĝan proponon. IPR bezonas konstantajn kunlaborantojn aŭ raportantojn el la tereno de ILEI:

Aŭstralujo, Belgujo, Brazilo, Britujo, Bulgarujo, Danujo, Finnujo, Francujo, Germanujo, Grekujo, Hispanujo, Irano, Islando, Israelo, Italujo, Japanujo, Jugoslavujo, Kolombio, Luksemburgo, Malto, Nederlando, Nordameriko, Norvegujo, Nov-Zelando, Polujo, Portugalujo, Sammarino, Sovetujo, Sud-Afriko, Svedujo, Venezuelo;

Turnante nun al tiuj gekolegoj, kiuj deziras helpi, mi petas bonvolu skribi al mi. Vi ja konas viajn nomojn, scias, kiuj povus skribi aŭ traduki; observu la pedagogian vivon en via lando kaj raportu!

Volonte mi publikigos vian nomon en IPR kiel sekcia raportanton.

Jam de tiu komunika trafiko de riĉa materialo dependas la regula apero de IPR. Se viaj poŝoj estas malplenaj vi povas aĉeti nenion. Sen materialo ankaŭ ne IPR!

La laborirado por IPR estis ĝis nun jena:

Post kiam la materialo redakte pretiĝis (tio postulas unu semajnon da tempo) ĝi estis registrite sendita al Edistudio en Pizo.

Mi nun atendadis la kompostajon. Longe!

Tuj post ricevo de ĝi konenciĝis la torturo por mi kaj almenaŭ du kunlaborantoj.

Tiom multe da preseraroj en la provaĵo, ne imageblaj, kvazaŭe enverŝita per sitelo plena de puloj. Kaj kvalitaj eraroj! Ni sidis dum tagoj.

Post kelke da tagoj la redaktoro resendis la korektitan tekston petante de Edistudio montri la relaboritan presprovaĵon.

Sed alia provaĵo, novaj eraroj! Denova korektado. Sed finfine mi havis novan IPR-on. Malfermante ĝin, mi jam vidis la unuajn erarojn.

IPR ekiras sian vojon el Italio registrite, en forajn landojn eĉ aerpoŝte. Ĝi submetiĝas al dekoj da poŝtaj sistemoj. Kaj efektive ĝi preskaŭ en la plimulto atingos la sekciojn. Kaj kompreneble ili tuj disdonos?


Aliflanke, se la legantoj tro longe atendas, bonvolu tuj informi min!

Por kroni niajn klopodojn esence plibonigi la situacion de IPR, ni trovu taŭgan kompostejon, kiu kvalite laboras, komprenas kaj regas plennetrie Esperanton kaj ne kaŭzu tro altajn kostojn.

Mi sondas je ĉiuj flankoj, eble la nuna numero jam estas kompostita aliloke.

Kun koraj salutoj

via



* "Registrite kiel terapio..."
apenas por teknikaj kaŭzoj
en n-ro 2!

El la „Tra la mondo” de Paul Bennemann

Skribladoj.

1. La ludantoj sidas ĉirkaŭ la tablo. Ĉiu havas antaŭ si kelkajn blankajn paperfoliojn kaj krajonon. La gvidanto skribas sur paperetojn po literon de la alfabeto de A ĝis Z. La paperetoj estas faldataj tiel, ke oni ne povas legi la literojn, kaj metataj sur telereton starantan meze de la tablo. Poste la gvidanto ordonas, ke tiu aŭ tiu el la rondo prenu unu el la paperetoj kaj donu ĝin al li. Li malfaldas ĝin kaj legas la literon sur ĝi skribitan. Ĉiu ludanto nun devas skribi sur sian paperon plejeble multajn vortojn, kiuj komenciĝas per tiu ĉi litero. Post kvin minutoj (la gvidanto kontrolas laŭ la horloĝo) la skribado estas haltigata. Nun ĉiu denombros la vortojn, kiujn li trovis; kiu havas la plej multajn, estas venkinto. La duan venkinton oni destinas jene: Ĉiu ludanto legas siajn vortojn. Kiam li eldiras vorton, kiun ankaŭ alia skribis, ili ambaŭ devas forstrecki la vorton. Postkiam ĉiuj estas legintaj, la dua venkinto estas tiu, sur kies papero nun restis la plej multaj vortoj. — Sekve prudenta ludanto skribos precipe tiujn vortojn, kiuj estas maloftaj kaj eble nekonataj de la aliaj.

Oni povas ankaŭ malfaciligii la ludon, se oni fiksas nur 3 minutojn por la skribado; aŭ oni destinas, ke estas permesitaj nur vortoj, kiuj havas 2, 3 aŭ 4 silabojn aŭ kiuj signifas beston aŭ planton aŭ senvivan objekton ktp.

2. La gvidanto ordonas: „Ŝanĝu ‚rozon’ en ‚violon’, aliigante aŭ aligante aŭ forlasante ĉiufoje nur unu literon!” La solvo estas ekzemple: rozo – rolo – volo – violo. Alia ekzemplo: „Ŝanĝu ‚beston’ en ‚homon!” Solvo: Besto – beto – bero – kero – koro – horo – homo. Tiaj ŝanĝoj ne estas tro malfacilaj, se oni scias sufiĉe da vortoj. Venkinto estas, kiu bezonis la plej malmultajn intervortojn. — Estas necese, ke la gvidanto antaŭe mem konvinkigu, ke la tasko estas solvebla.

3. „Perdita – trovita.” — Ĉiu kunludanto ricevas paperon, sur kiun li devas skribi la respondojn laŭ jenaj demandoj: 1) Kiu perdis? 2) Kion li perdis? 3) Kie la objekto perdiĝis? 4) Kiun longon ĝi havis? 5) Kiun larĝon? 6) Kiajn kromajn karakterizajn ecojn? 7) Kie ĝi estas redonota? 8) Kiun dankon ricevos la trovinto? Sed la ludantoj ne skribas ĉiujn respondojn sur sian propran papereton; sed skribinte la unuan respondon ĉe la supran randon, oni faldas la randon tiel, ke la skribaĵo ne plu estas legebla. Poste oni

transdonas la papereton al la maldekstra najbaro kaj prenis la folion (ankaŭ falditan) de la dekstra. Tiamaniere la posta skribanto ne scias, kion skribis la antaŭaj, kaj la respondoj tute ne harmonias laŭ la senco. Sed ĝuste tio estas la ĉarmo de tiu ĉi tre amuza ludo. Kiam la demandoj estas responditaj, la paperetoj estas faldataj ĝis la malsupra rando kaj metataj en la mezon de la tablo. Poste la ludantoj unu post la alia elprenas el la amaso unu papereton kaj laŭtlegas, kio estas skribita sur ĝi. Se la ludantoj skribis plejeble ŝercajn respondojn, la teksto estas treege komika ekz.: „Mia frato Henriko (1) perdis sian nazon (2) en la bankuvo (3). Ĝi estas tri mejlojn longa (4) kaj larĝa kiel nia tablo (5). Ĝia dekstra angulo estas forrompita (6). La trovinto redonu ĝin al nia patrino (7) kaj ricevos kison. (8).”

La „Ludo de l’ 15”

En la jaro 1878 surdmuta amerikano eltrovis ludon, kiu havis sukceson, kiel preskaŭ neniu alia antaŭe aŭ poste. El la angle parolantaj landoj, kie oni nomis ĝin „Fifteenth Puzzle”, ĝi venis al Germanujo („Boss-Puzzle”) kaj Francujo („Jeu du taquin”). Oni legas, ke tiutempe eĉ en la tramoj la veturantoj kunhavis kaj uzis la ludon, kaj ke kontrolĉefoj devis pendigi afiŝojn kun la ordono, ke dum la laborhoroj la ludado per la „Puzzle” estas plej severe malpermesita.

Ĉiu povas mem prepari por si tiun ĉi interesan ludilon. Oni prenu 15 kartondiskojn kun diametro de 18 mm kaj skribu sur ilin la numerojn 1 ĝis 15. Poste oni desegnu sur kartonfolio kvadraton 8 cm longan kaj altan kaj dividu ĝin per vertikalaj kaj horizontalaj linioj en 16 kvadratojn. Sur tiujn ĉi oni metu la diskojn laŭ tute hazarda ordo (ekz. kiel sur la unua bildo) tiel, ke la kvadrato dekstre malsupra restas malplena kaj nun ŝovu la diskojn de unu kvartalo al najbara (se ĝi estas neokupita), ĝis la natura ordo laŭ la dua bildo estos atingita.

3	9	6	15
12	5	13	8
2	14	10	1
7	11	4	

1.

1	2	3	4
5	6	7	8
9	10	11	12
13	14	15	

2.

	1	2	3
4	5	6	7
8	9	10	11
12	13	14	15

3.


Al provemuloj mi volas malkaŝi, ke ne ĉiam la tasko estas solvebla. Sed en tia okazo (kiam la normala pozicio ne estas atingebla), oni povas ĉiam atingi la grupigon de figuro 3.

Malfacila transkonduko.

Riĉa bienposedanto havas stalon kun 7 fakoj. En la tri maldekstraj fakoj staras po

unu blanka ĉevalo; en la tri dekstraj fakoj staras po unu nigra ĉevalo, la meza fako estas neokupita.

Nun la nigraj kaj blankaj ĉevaloj devas ŝanĝi siajn lokojn tiel, ke la blankaj estas kondukataj dekstren, la nigraj maldekstren, sed ĉiam nur en la apudan aŭ la duan fakon, se ĝi estas neokupita. Estas ankaŭ malpermesite, konduki iun ĉevalon returnen.



Ankoraŭ tri ludoj por gajaj kunuloj.

1. Mi vidis ĝin!

La aranĝanto de la ludo montras al la societo malgrandan objekton, ekz. ringon. Poste ĉiuj personoj forlasas la ĉambron, escepte de la aranĝanto. Tiu metas la objekton en iu kaŝitan lokon, kie ĝi tamen povas esti vidata, sen ke oni bezonas forpreni aŭ malfermi ion (sekve ne en fermitan keston, sub vazon ktp.). Poste la societo re-venas kaj serĉas la objekton. Kiu ĝin vidis, ne tuŝas aŭ forprenas ĝin, sed ŝajne serĉas ankoraŭ alialoke, por ne atingi la aliajn serĉantojn, kaj fine eksidas sur seĝon dirante: „Mi vidas ĝin!” samtempe li donas al la aranĝanto papereton, sur kiun li skribis la lokon, kie li vidis la kaŝitan objekton. – Kiu serĉas plej longe, poste devas denove kaŝi la objekton.

2. Diveno de urbnomoj.

La komencanto imagas la nomon de iu urbo kaj eldiras ĝian komencan literon. La sekvanta provas diveni la nomon kaj eldiras la duan literon. La tria ludanto aldonas la trian literon, ĝis la nomo estas kompleta. Plejofte la fine trovita nomo estas tute alia ol tiu, kiun imagis la komencanto. Ekzemple la unua ludanto diras: L, kaj pensas al London. La dua aldonas: i (Lisboa), la tria: m (Limoges), la kvara a, kaj la nomo Lima (kie ĝi kuŝas) estas kompleta. – Anstataŭ urbnomoj oni povas ankaŭ sammaniere diveni la nomojn de famaj viroj, de plantoj, de bestoj, ktp.

3. La malpermesita sepo.

La ludantoj sidas ĉirkaŭ la tablo kaj rapide diras laŭvice la nombrojn tiel, ke ĉiu eldiras nur unu nombron. Kiu trafas nombron, kiu enhavas la sepon (7, 17, 27, 70-79 ktp.) aŭ kiu estas dividebla per 7 (14, 21 ktp.), devas diri anstataŭ la nombron la vorteton „brrr!” Kiu eraras aŭ tro longe pripensas, devas doni malgrandan punon.

Li ne povas ekstari

Vetu kun via amiko, ke vi povos lin sidigi sur seĝon tiamaniere, ke li ne kapablos ekstari. Verŝajne li ne kredos tion. Tiam sidigu lin sur la seĝon kaj ordonu, ke li metu la manojn sur siajn genuojn kaj nepre lasu ilin tie. Poste tiru liajn piedojn iom antaŭen tiel, ke ili staras unu apud la alia eble 20 centimetrojn antaŭ la piedoj de l' seĝo. Tiam via amiko ne povos ekstari.

Sur telero kuŝas 5 ovoj. Kiamaniere 5 personoj povos dividi ilin inter si tiel, ke ĉiu persono ricevos unu ovon kaj unu restos sur la telero?

(Unu persono prenu la teleron kun la ovo.)

Knabo havas 4 paperetojn, sur kiuj staras la ciferoj 2, 5, 8, 9. Kiom da nombroj li povas formi el ili?

(Dudekkvar. Kiuj ili estas?)

Forprenu!

El 15 alumetoj formu sur la tablo jenan figuron:



Poste forprenu 3 alumetojn tiel, ke restas nur 3 kvadratoj.

Sur arbo sidas 7 kornikoj. Mi prenas pafilon kaj pafas unu. Kiom restas sidantaj? (Neniu; ĉar la aliaj forflugos.)

Knabino kondukas siajn anserojn al la paŝtejo. Unu ansero marŝas antaŭ du, unu inter du kaj unu post du. Kiu estas la nombro de la anseroj?

(Tri; ĉar ili marŝas unu post la alia.)

Dancludo

plej bone danceblaj sub blua ĉielo sur verda herbejo!

I

Foriru, foriru, mi ne amas vin!
Alvenu, alvenu, ho korbelulin'!
Rudirallalala, mi havas kunulon,
li ŝatas nur min!

Rezultoj de la laborgrupo de la 16a ILEI-Konferenco

El „Informilo” 1982 de Bulgara Esperanto Asocio

a) *Nerapide.*

For - i - ru, for - i - ru, mi ne a - mas vin! Al - ve - nu, al -

rit. c) *a tempo*

ve - nu, ho kor - be - lu - lin! Ru - di - ral - la - la - la, ru - di -

d)

ral - la - la - la, mi ha - vas kun - ul - on, li ŝa - tas nur min!

Junuloj kaj junulinoj staras pare en cirklo (fig. 1). Ĉe „a” ili deturnas sin unu de la alia, la junuloj irante al la centro de l' cirklo, la junulinoj eksteren. Per piedfrapoj, mienoj kaj mangestoj ili esprimas malŝaton. Ĉe „vin” la pozicioj estas kiel fig. 2. Ĉe „b” ili sin turnas, kaj la junuloj rigardas al la knabino, kiu estas la sekvanta post la ĝisnuna danckunulino. Ili logas per la fingro kaj gaja mieno, la knabinoj hezitas: poste ambaŭ ridetante paŝas unu al la alia kaj kaptas ambaŭ manojn. La cirklo staras ree kiel ĉe fig. 1. De „c” ĝis „d” oni dancas malrapidan valson kaj finas per longa, profunda reverenco ĉe la vortoj: „Mi havas kunulon — —.” Estas plej bone, se nombro de nedancantoj staras apude kaj kunkantas.




Fig. 1




Fig. 2

1a temo – Informado al infanoj.

Oni prezentu bildon de Zamenhof kaj rakontu per simplaj vortoj pri lia infaneco. Oni rakontu pri ebleco de eksterlandaj vojaĝoj pere de Esperanto, lingvo por ĉiuj popoloj. Oni komparu la malfacilecon de sia (alia) nacia lingvo por montri la facilecon de Esperanto. Oni parolu pri amikoj en alilando, pri kolektado de diversaj objektoj. Oni montru Esperanto-korespondaĵojn de aliaj Esperanto-lernantoj. Oni montru interesan objekton de alilandaj esperantistoj (bumerango, mineraloj, pupoj ktp.). Oni faru ekspozicion de infandeseĝnaĵoj de alilandaj Esperanto-lernantoj kaj poste disponigu ĝin al Unesko. Oni prezentu denaskan Esperanto-infanon aŭ malnovan Esperanto-lernanton, kiu parolu pri Esperanto.

2a temo – Informado al gepatroj (geavoj)

Oni kunvoku la gepatrojn en la lernejon por informi ilin pri la utilo de Esperanto. Oni uzu laŭeble radioreton aŭ televidon tiucele, kien la interesitoj sendu siajn adresojn; krome oni povas organizi konkurson je temo pri Esperanto kun premioj. Oni invitu gepatrojn viziti alilandan Esperanto-aranĝon por konvinkiĝi pri la utilo de Esperanto. Oni sendu okaze de la naskiĝtago de Zamenhof Esperanto-lernantojn transdoni bukcedon de floroj al ĉiu familio loĝanta en stratoj ESPERANTO kaj ZAMENHOF; krome oni metu florkronon sur ties ŝildoj. Oni vizitu aliurban lernejon kaj parolu al gepatroj pri Esperanto. Oni atentigu la gepatrojn, ke post la lernado de Esperanto la lernantoj pli facile studos alian nacian/fremdan lingvon. Oni donacu al (kelkaj) gepatroj librojn de nacia literaturo tradukitajn en Esperanton, same al lernejestroj. Oni parolu pri Esperanto ankaŭ al la membroj de la Gepatra Komitato en la lernejoj.

3a temo – Informado al gekolegoj

Oni sendu bildkartojn al siaj gekolegoj el alilanda partopreno de Esperanto-aranĝo

(kun multaj subskriboj – MB). Oni interesigu la gekolegojn pri ilia fako aŭ hobiaj per libroj en Esperanto. Oni interesigu gekolegojn pri ebleco de alilandaj kontaktoj kun samfakuloj. Oni parolu nur Esperantlingve eĉ pri profesiaj ĉiutagaj aferoj antaŭ siaj gekolegoj, se estas alia esperantisto.

4a temo – Informado al politikistoj

Oni serĉu esperantistojn aŭ amikojn de Esperanto inter parlamentanoj kaj instigu ilin pri laboro por Esperanto; same agu kun aliaj gravaj politikistoj aŭ aŭtoritatoj. Oni ĉiam invitu politikistojn/aŭtoritatojn al Esperanto-kunveno, aranĝoj k.a. Oni elektu similan gravulon kiel honoran prezidanton de Esperanto-societo ktp. Oni prezentu dokumentojn por Esperanto al Ministerio de Klerigo/Edukado aŭ al aliaj instancoj. Oni kunlaboru kun aliaj publikaj organizaĵoj sur la bazo de amikeco kaj paco.

5a temo – Kion post la Esperanto-kurso

Oni nepre korespondigu la lernantojn kun alilandaj samaĝuloj. Oni organizu por pli aĝaj Esperanto-lernantoj diskotekon aŭ similan amuzan aranĝon en Esperanto. Oni organizu ekskursojn enlandajn aŭ eksterlandajn. Oni organizu Skoltajn Grupojn por amikeco kun alilandaj similaj grupoj. Oni prezentu peton al Regiona aŭ Distrikta estraro por ricevi financon helpon por sia Esperanto-agado (partopreno de junuloj en enlanda aŭ eksterlanda Esperanto-aranĝo kaj por premiigo de la plej kapablaj Esperanto-lernantoj).

Por la Laborgrupo: Marin BACEV

Konsiloj el metodiko de fremdlingva instruado

de Ana Ilieva

1. De la viva kontemplado al la abstrakta pensado kaj de la abstrakta pensado al la praktiko mem.
2. La nova materialo estu ĉiam bazita sur malnova scio.
3. Ju pli riĉa estas la sistemo de asociadoj ligitaj kun certa vorto, des pli forta estas la ĉeno de nervaj ligoj provizoraj.
4. Oni laboru nepre per objektoj, bildoj, pentraĵoj, desegnaĵoj k.s.
5. Vortojn ligitajn per bildoj oni pli facile alproprigas.
6. En la gepatra lingvo Vorto kaj Objekto estas senpere ligitaj – oni devas marŝi laŭ la sama vojo: demonstro kaj elparolo.
7. La bildo malhelpas al la penso reveni al la gepatra lingvo.
8. La elmonro stimulas sentradukan komprenon, kreante kondiĉojn por pli rapida alproprigo de la fremda lingvo.
9. La percepto de la objekto estas pli vigla, pli klara, pli konkreta ol la imago pri ĝi.
10. La reprodukto de la vorto ĉe senpera observo de la objekto estas pli facila.
11. Ĉe demonstro de objekto aŭ bildo la fremda vorto ligiĝas senpere kun ĝi.
12. Rekta metodo – senpera ligo de la vorto kaj nocio sen gepatra lingvo.
13. En la komenco la instruisto devas krei ĉe la lernantoj aŭd-parolajn kutimojn.
14. Oni povas korekte reprodukti nur tiujn sonojn, kiujn oni bone perceptis aŭde.
15. La ofta parolado firmigas la lingvajjn konojn, ĉar samtempe ni aŭskultas nin mem.
16. En la komenca klaso de fremdlingva instruado ĉiun demandon de la instruisto devas ripeti apartaj lernantoj kaj poste la tuta klaso.
17. La rakonto estas la plej facila ekzercado en monologa parolo.
18. La lernantoj des pli bone respondas, se ili pli bone ripetas la demandojn de la instruisto.
19. Oni ne devas traduki frazojn kaj propoziciojn, kiuj estas komprenataj sen traduko.
20. Aktiva leksika minimumo: a) instruisto demandas kaj li mem respondas montrante bildon aŭ objekton; b) instruisto demandas kaj lernantoj respondas; c) lernantoj demandas kaj ili mem respondas.
21. Oni devas parkere scii la demandojn al ĉiu legaĵo kaj la lernantoj devis respondi per

- ili unu la alian – dialogado de tekstoj.
22. La parolo konsistas ne el apartaj vortoj kaj formoj, sed el sencaj tutoj.
 23. La vortoj havas signifon, la propozicioj... senson.
 24. Hejme la lernanto devas legi laŭvoĉe la tekston kaj eltiri el ĝi la novajn nekonatajn vortojn.
 25. La parolo prezentigas en tri formoj: buŝa parolo – aŭda percepto, skriba parolo – vizuala percepto, artikulad/skribad-kinetika percepto.
 26. Ĉe ne bone alproprigita leksika, grammatika, fraza materialo la interna parolo funkcias en gepatra lingvo kaj ĝia sonigo realiĝas en la fremda lingvo.
 27. La komencanto devas nepre legi laŭvoĉe por pli bone memori la vortojn kaj frazojn.
 28. Ordinare la studanto de fremda lingvo ne povas kompreni parolon en radio kaj de fremdulo – tio estas manko de kutimo percepti la lingvaĵon de aliaj personoj aŭ simple laŭ aŭda voĉo
 29. La instruisto devas elparoladi la sonojn malrapide, klare kaj korekte.
 30. La disdividon de la lingvaj lertecoj kaj kutimoj oni atingos ne per izolita ripetado de la leksiko kaj de la gramatikaj unuoj, sed per ilia aplikado en nova kunmeto, en nova kunteksto.
 31. La bezono de la vivo postulas unualoke la disvolvon de la buŝa parolo, t.e. de aŭdaj kaj parolaj kutimoj.
 32. Tamen oni ne subtaksu ankaŭ la ceterajn lingvajn agojn: legado, tradukado kaj skribado.
 33. La bezono de la vivo postulas unualoke la disvolvon de la buŝa parolo, t.e. de aŭdaj kaj parolaj kutimoj.
 34. La nova vorto devas esti ekzercata en kombino kun jam bone konataj vortoj.
 35. La pensa agado dum la fremdlingva lernado trapasas komplike kaj malfaciligite, per pli granda kontrolo de la konscio, per pli granda streĉo de la volo kaj de la atento, kun forta enmiksiĝo de la gepatra lingvo kiel stopiga faktoro.
 36. Por disvastigi la buŝan parolon unualoke oni devas meti ne la apartan vorton, sed la vortkunmeton, la frazon, la propozicion, la parolan modelon.
 37. La fremdlingvaj konoj baldaŭ malaperos pro manko de teoria apogo, de lingva medio kaj pro malmulte da semajnaj okupoj.
 38. La vorton oni devas klarigi ĉiuflanke: fonetike, grammatike kaj ortografie.
 39. Sen aŭda percepto kaj sen reproduktado oni povas scipovi nek paroli, nek legi, nek skribi en fremda lingvo.
 40. La fremda lingvo ne povas esti lernita laŭ aŭd-parola procedo.
 41. Kiam la lingvo estas parolata de alilandanoj ekster la koncerna lando, la lingvo submetiĝas al ŝanĝoj, kiuj estas tute natur-leĝaj kaj sendependaj de la volo de la parolantoj.
 42. La praktika ekposedo de la fremda lingvo estas senpere ligita kun la ellaboro de korekta elparolo.
 43. La ĥora parolado plimultiĝas la tempon por parolo de ĉiu lernanto.
 44. La vortojn oni pli facile alproprigas en frazoj, en propozicioj ol aparte uzataj: alproprigu parolajn, ne leksikajn unuojn.

45. La baza celo de la fremdlingva instruado estas formado de lingvaj lertecoj kaj kutimoj.
46. La novaj konoj kaj lertecoj en la fremdlingva instruado bezonas ĉiutagajn zorgojn kaj subtenon por disvolviĝo.
47. Oni ne supertaksu la lingvan sistemon malprofite al la lingva praktiko – ne konoj pri la lingvo, sed konoj en la lingvo.
48. La vekado de la cerbo, de la fantazio, de la intereso, de la sento (ke la lernanto povas uzi la lingvon) kaj de la ĝojo – tio estas la motivoj por subteni la intereson kaj plifortigi la volon por studi fremdan lingvon.
49. Oni nepre uzu la tiel nomatajn Internaciajn Klubojn de Amikeco.
50. La sukceso en la fremdlingva instruado dependas de la lerteco veki intereson al la laboro.
51. La instruadon oni organizu tiel: facile, interese, varie, alloge, ilustre, kun ludoj kaj kantoj.
52. Oni devas nepre emfazi la gravecon de la nova instrumaterialo kaj la utilon de ĝia alproprigo – tiel la lernantoj koncentrigas kaj enkapigas ĉion jam en la instruohoro mem.
53. Daŭrajn konojn kaj lertecojn oni ricevas nur pere de la lingva praktiko.
54. La instruisto aktivigu ne sin mem, sed pense kaj lingve la tutan klason.
55. Ĉiutage oni aŭskultu, pensu, parolu, skribu, legu kaj traduku en la lernatan lingvon.
56. La lernado de kantoj vivigas la instruon procedon.
57. Oni lernu malmultajn vortojn, sed la plej uzatajn.
58. La plej konataj vortoj ne ĉiam estas la plej uzataj.
59. En la unua instruaro oni uzu multe da lingvaj ludoj – ili aktivigas la tutan klason, kreas kutimon al tuja reago.
60. Ĉiuj invitoj, ordonoj, alparoloj, demandoj ligitaj kun la instrua laboro devas esti en la fremda lingvo.
61. La konoj pri grammatiko ne devas esti nur mekanika ripetado de la reguloj, sed apliko en la viva praktiko.
62. Ĉe kreo de kutimo al starigo de demandoj oni devas komenci per ekzercoj, en kiuj oni demandas pri la subjekto, pri la predikato, pri la objekto, pri la cirkonstanca komplemento.
63. La instruohoro finiĝu per konversacio laŭ la nova teksto.
64. Ĉe ekzercado la frazoj estu pense ligitaj – alimaniere ili enuigas.
65. La bona memsento dependas de tio, ĉu ni laboras kun ĝojo aŭ ne...
66. Oni diru kunmetojn kaj frazkonstruojn en la gepatra lingvo kaj la lernantoj serĉu ilin en la koncerna teksto legante ĝin voĉe.
67. La voĉlego estas proksima al la aŭskultado kaj al la kompreno.
68. La fremdlingva leksiko kaj grammatiko estas lingva teorio, kaj ĝia apliko dum parolo, legado kaj skribado – lingva praktiko.
69. Senpera ligo de la lingvo kun la vivo mem estas: korespondado, fremdlingvaj vesperoj, aŭskulto de gramofondiskoj/ radio, parolo.
70. La skriba lerteco ofte postrestas post la parola lerteco.

71. En la kajeroj-vortaroj estu fako por enskribo de frazoj.
72. Oni skribu la novajn vortojn kaj frazojn antaŭ la komenco de la leciono sur la nigra tabulo – poste la lernantoj transskribu ilin kaj ili mem skribu ilian signifon.
73. La skribado estas efika rimedo por firmigo de la fonetikaj konoj.
74. Iuj lernantoj ne reproduktas skribe la aŭditan vorton, sed kopias de la nigra tabulo ĝian skriban konsiston – la lingva materialo ne estas ankoraŭ aktive alproprigita.
75. La diktado estas aŭskultado, kompreno kaj skribado.
76. Dum diktado la instruisto ne devas ripeti multfoje apartajn vortojn aŭ vortgrupojn.
77. La lernanto devas percepti aŭde la tutan frazon aŭ propozicion, reprodukti ĝin skribe en ĝia tuto – ne kapti apartajn vortojn!
78. Por hejma laboro oni postulu skriban rakonton de la teksto en alia persono (aŭ nombro) – precipe en la persono de singularo.
79. La transskribo de teksto estas kunigo de legado kun skribado.
80. Ĉefa rimedo por memkontrolado estas la inversa traduko – unue oni traduku de la fremda en la gepatran lingvon kaj poste tute memstare oni faru tradukon en la fremdan lingvon.
81. Oni faru vortaron-minimumon de la plej uzataj vortoj.
82. La instruado finiĝu per konversacio laŭ la nova teksto.
83. El ordinara legaĵo „Voku kuraciston!” pere de demandoj: „Ĉu li venis?” „Ĉu oni pagis lin?” oni atingas edukan celon.
84. La parola modelo unuigas la propoziciojn laŭ ilia semantika struktura esenco kaj estas tre utila.
85. La lernantoj devas scipovi legi la vortojn silabe.
86. La Esperanta sono „h” similas al la b ulgara en la vortoj *ehe*, *aha*.
87. La tradukoj estas duspecaj: laŭvorta kaj laŭsenca (adekvata).
89. La perceptiva lerteco estas kapablo kompreni fremdajn pensojn en parola aŭ skriba formo.
90. Al la reprodukta celo servas: voĉlegado, transskribo, kompletigo, transskribado kun modifo, kunmeto de propozicioj per donitaj vortoj.
91. La lingva materialo devas nepre renkontiĝi en alia situacio.
92. La instruado ne estas efika kiam la teksto enhavas kaj novan gramatikon, kaj novan leksikon.
93. La lernantoj laboras pli konscie kaj pli aktive, kiam ili scias kion ili faras kaj kial ili faras ĝin.
94. La ripetadon oni ne faru per malnovaj manieroj kaj en la sama ordo – tio malpli altigas la atenton.
95. Pli bone ne instrui dum kontrolo de la konoj, sed kontroli dum la instruado.
96. La malkovro de la novaj vortoj, ilia firmigo kaj la disvolvo de la parolaj lertecoj kaj kutimoj devas okazi kun la aktiva partopreno de la lernantoj mem.
97. La skribado de la novaj vortoj dum la rakonto malfortigas la atenton de la lernantoj.
98. La konversacio povas esti interrompita – por montri bildon aŭ objekton, por demonstri agon, uzi mimikon aŭ gestojn, kiuj helpas la semantikon.
99. La procedo de la kono trapasas de la viva kontemplado al la abstrakta pensado kaj de

- ĝi al la praktiko.
100. Konoj alproprigitaj pere de mekanika ripetado de reguloj kaj de formuladoj deŝiritaj de la praktiko estas nerealaj.
101. La tasko estas ne firmigi la regulojn, sed spertigi ilian uzon, disvolvi lingvajjn lertecojn kaj kutimojn.
102. La sukceso de la laboro dependas de la sistema demandado kaj kontrolo.
103. La ĉiuhora kontrolo de la konoj kutimigas al konstanta laboro.
104. La kontrolo de la hejma laboro devas okazi nepre dum la sekva instruado.
105. Ne beklernado de parolformoj, sed apliko en la praktiko.
106. Celo de la kontrolo devas esti ne la alproprigo de la apartaj vortoj, formoj aŭ frazkonstruo, sed kiel oni uzas ilin en la parola kaj en la skriba lingvo.
107. La oftaj interrompoj faras la necertan lernanton pli necerta.
108. Laborante kun la klaso – pensu pri la aparta lernanto; laborante kun la aparta lernanto – pensu pri la tuta klaso.
109. Jam dum la unua kaj dua konoj devas scipovi starigi la demandojn: Kio estas tio? Ĉu tio estas...? Kia estas la...? Kie estas la...? Kiu estas tiu? Kion faras...? Kiel vi faras?
110. La instruado estas submetita je konstanta efiko de la malĝusta elparolo de la lernantoj.
111. La magnetofono estas rimedo ne nur por instrui al la lernantoj, sed ankaŭ por perfektigo de la elparolo de la instruisto mem.

Elektis kaj tradukis: Marin Bacev

Amerika Asocio

Bulteno, Januaro 1982

Jen tradukitaj citaĵoj el anglalingva artikolo titolita „Three Americans in Paris: A Look at ‚Natural’ Second Language Acquisition”, kiu aperis en la „MLA Journal” aŭtune 1981:

En la disvolviĝo de kompetenco en dua aŭ fremda lingvo, la plej grandan rolon ludas la sinteno de la lernanto... Lingvoinstruistoj jam komencas inkluzivi en la kursaro la ŝancon por signifplenaj, spontaneaj esprimoj je elementaj niveloj, kun maksimumo da konteksto – la dua lingvo ĉirkaŭas la lernanton, kiu uzas ĝin por komuniki signifon – kaj minimumon da gramatikaj klarigoj. Eble la jena historio pligrandigos nian komprenon pri tia lernado.

Temas pri tri Usonaj junuloj kiuj loĝis en Parizo unu jaron: 14-jara Danielo, kiu lernis la francan dum unu jaro; kaj 19-jara Catherine kaj 8-jara Julie, kiuj sub privata instruisto studis francan gramatikon kaj legadon dufoje ĉiusemajne dum unu somero. Ĉiuj tri ĉeestis publikajn franclingvajn lernejojn en Parizo.

La unuan tagon Daniel troviĝis en la lerneja korto kun cent aliaj samaĝaj lernantoj. Kiam la lernejestro vokis nomon de lernanto, tiu stariĝis kaj indikis sian klason. Sed kiam Daniel stariĝinte respondis je sia nomo, li ricevis fortan riproĉon ĉar li parolis al la estro kun manoj enpoŝaj.

Intertempe, ĉe alia lernejo, Catherine ekploris ĉar oni neintence ne vokis sian nomon, kaj ŝi ne sciis kiel france klarigi tion. En ambaŭ kazoj, la Usonaj infanoj je tiuj krizaj momentoj ne malesperis sed daŭris la klopodojn; alie ili neniam iĝus dulingvaj.

Dum la posta lernado, disvolvis la jenaj kvar etapoj, sen antaŭplano:

1. La gepatroj parolis al la gefiloj angle, kaj unu al la alia ambaŭlingve; kaj la gefiloj parolis angle inter si.
2. La gepatroj parolis nur france unu al la alia kaj al la gefiloj, kaj la gefiloj parolis angle inter si.
3. Ĉiuj en la familio parolis nur france unu al la aliaj.
4. Post la reveno al Usono, la gepatroj kaj la gefiloj daŭre parolis france inter si ĉehejme.

La aŭtoro Sandra Savignon sugestas la jenan konsekvencon konsilon por instruistoj:

- a. En la klasĉambro ne eblas tute imiti la fremdlingvan medion. Tial la niveloj de kompetenco ŝanĝiĝas laŭ emfazo kaj malkovro.

- b. En la klas-ĉambro oni celas lingvan kompetencon; en fremdlingva medio, komunikadon. Por komuniki, ne necesas uzi perfektan gramatikon. Do, verŝajne instruistoj devus labori al ambaŭ celoj.
- c. Tre grava estas la rolo de imitindaj parolantoj de la fremda lingvo ekster la klasĉambro.

Bulteno, Junio 1982

Dum mi partoprenis progresigan Esperanto-klason ĉe „San Francisco State University” la pasintan someron, mi ĉestis gaste ĉe du el la mezgradaj klasoj kaj tie observis kelkajn imitindajn instru-metodojn faritajn de la instruistoj James Cool kaj Charles Power: ekzemple:

1. *Kiam lernanto eraris*, la instruisto
 - a. diris (Esperante aŭ anglelingve, depende de la kapableco de la lernanto) „Mi ripetos tion kion vi ĵus diris: Kio mankas?”
 - b. Ripetis la radikon kaj paŭzis, por ke la lernanto rekonsideru la finaĵon.
2. *Kiam ajn lernanto ĝuste respondis*, la instruisto kuraĝigis lin/ŝin per tiaj frazoj kiaj „Petro brilas hodiaŭ!” „Brave!” „Bone!” ktp.
3. La instruisto ofte *rilatis la lecionon al personaj aferoj de la klasanoj*; ekz.
 - a. Faris tiajn demandojn kia „Ĉu vi estos en la klaso vendredon?”
 - b. Kiam legata historio temis pri koleriĝo, oni demandis al ĉiu lernanto „Ĉu vi iam kole-riĝis? Pri kio? Kion vi diras kiam vi kole-riĝas?”
 - c. Kiam ĝi temis pri familia situacio, oni faris al ĉiu lernanto tiajn demandojn kiaj „Ĉu en via familio estas dombesto?” „Ĉu vi havas gefratojn?”
4. De tempo al tempo oni faris *ludojn*; ekz.: Oni ludis „Dudek Demandojn” sed por ĉiu ero ŝanĝis la rimedojn; ekzemple:
 - a. Ĉiu respondanto ne rajtas diri la vortojn „ne”; aliloke, „mi”; ktp.
 - b. Ĉiu respondanto ripetas en sia respondo la lastan vorton de la demando.
 - c. Ĉiu respondas kvazaŭ li/ŝi estus d-ro Zamenhof.
 - d. La respondantoj silentas post la unua demando kaj respondas nur al la antaŭlasta demando.
 - e. Ĉiu respondas per nur kvin vortoj.

La celo ĉiufoje estis diveni la rimedon.

Unu el la lernantoj, lingvistika profesoro Thom Hess kaj AAIE-ano kiu instruas Esperanton en Victoria, B.D., Kanado, sugestis la jenajn instru-metodojn, kiujn li uzas por instrui al Indianoj kiel instrui sian lingvon al junuloj:

1. Ekskursu al parko aŭ arbareto, kie oni lernas la nomojn de arboj kaj plantoj per unuopa palpado de ties folioj, barko, semoj, floroj, ktp.
2. Du aŭ pli grupoj da klasanoj iru inter la lernejoj konstruaĵoj por trovi objektojn kies nomoj (en la cclita lingvo) troviĝas sur antaŭe preparita kaj disdonita listo.
3. Uzante Esperanto-numerojn, la lernantoj ludu „Bingo”. La instruisto anoncas ĉiun numeron tuj post la antaŭa, por ke la lernanto ne havu tempon traduki en la anglan. Post 45 minutoj la lernantoj ellernis la numerojn, kiujn ili poste daŭre rememoros.

(D. Holland)

Usonona Ekzamena Servo

1a-7-1981 – 15a-7-1982

a) Komencgrada Ekzameno :	20
b) Unugrada Ekzameno :	10
c) Mezgrada Ekzameno :	5
Entute	35
Esperanto-kursoj 1981-1982 1-9-1981 ĝis 1-7-1982	
Infanoj :	73
Junuloj :	247
Plenkreskuloj :	350
Entute :	670

Edukado

El „Norvega Esperantisto” N-ro 6, 1982

Oni povas dividi la temon en du partiojn: edukado de ne-esperantistoj kaj edukado de esperantistoj. Kelkajn punktojn sub „edukado de ne-esperantistoj” devus pristudi la instruista sekcio, eventuale en kunveno dum la landa kongreso de NEL en 1983. En tiu kazo la partoprenontoj ricevu anticipe skriban materialon pri la temoj.

A. Edukado de ne-esperantistoj

Eĉ ekster la kadro de la baza lernejo dezirindas por-infana lernolibro kun kasedoj, destinita por mem-studado.

En la baza lernejo la lernantoj plej serioze okupiĝas pri tiuj studobjektoj, kiuj rekte donas kompetentecon por plua studado en daŭrigaj lernejoj. Ekzemple, studinte la francan lingvon en la baza lernejo, oni povas elekti ĝin kiel B-lingvon en la „gimnazio” („vide-regående skole”). Tiam eblecon ne prezentas Esperanto. La enkondukon de Esperanto en la lernejojn do devas akompani plialtiĝo de la prestiĝo de Esperanto, i. a. inter la instruistaro. Paŝo en tiu direkto estas, ke la aŭtoritatoj agnoskas la instruistan ekzamenon de Esperanto kiel kompetenteco-donan pluedukon por instruistoj. NEL jam sendis al la ministerio proponon, kiu respektas la kondiĉojn metitajn de la ministerio.

B. Edukado de Esperantistoj

Necesas lingva perfektigado. Ofte la informado pri la facila lingvo Esperanto malbone harmonias kun la fakto, ke eĉ delongaj Esperantistoj balbutas en Esperanto. La lingva perfektigado povas okazi per aktiviga lingva instruado dum klubkunvenoj, per studrondoj pri lingvaj kaj tradukaj problemoj ktp.

Verbado ofte okazas individue, kaj kelkfoje la nov-varbitoj estas plej efike konservataj per tio, ke la varbinto mem instruas ilin. Por tiaj okazoj necesas, ke la Esperantistoj ĝenerale estu informataj pri elementaj principoj de Esperanto-instruado.

Gravas organize kaj pri-movada edukado de la Esperantistoj, kaj precipe gravas, ke ni sciu, kiel plej trafe prezenti nian aferon al ne-esperantistoj. Antaŭaj spertoj povus

esti utilaj tiurilate. Tial estas bedaŭrinde, ke ne aperis raporto pri la rezultoj de la informa kaj varba jaro de NEL. Oni proponis tri vojojn por plibonigi la situacion:

1. Næss pretas aranĝi kursojn pri organiza kaj informa laboro;
2. NEL havigos liston, ellaboritan en Danlando, de 20 demandoj, kiujn ofte ricevas Esperantistoj.
3. Ni tenu la membrojn konstante informataj pri la aktualaĵoj en la Esperanto-movado.

Spertoj

pri universitata lektorato de Esperanto

D-ro Leszek Kordylewski – Lektoro de Esperanto
en la Jagiellona Universitato en Krakovo, Pollando

Bernard Golden en sia artikolo: „Normoj kaj celoj de la universitata instruado de Esperanto” (IPR 1,3-12, 1980) prave emfazis la gravecon de la universitatgrada instruado de la Internacia Lingvo. La esperantistigo de la juna intelektularo, kiu parte transformiĝos en la junan generacion de instruistoj, sendube meritas esti en fokuso de la interesiĝo de esperanto-pedagogoj. Tamen, nemultaj el ni povas influ tiun, kio okazas en la universitatoj. La spertoj de Golden estas bazitaj sur la esceptaj sukcesoj de Budapeŝta Universitato, kiu estas unika pro ĝia Esperanto Fakoj. La ambicia tasko amase fondi Esperanto Fakojn en aliaj universitatoj nun certe superas la eblecojn pro la (provizora, mi kredas) manko de la intereso pri Esperanto inter la universitataj lingvistoj. Krome, la tasko de iu Interlingvistika Fakoj ĉe Filologia Instituto estos certe ne nur instrui la lingvon, sed precipe ankaŭ fari esplorojn. Por tio oni devas havi bazon: interalie la esplorantojn interesitaj pri Esperanto*. Mia nuna celo estas prezenti multe pli simplan metodon enkonduki Esperanton en la universitatojn, kiel instruobjekton sen neceso krei la esploran fakon.

Miaj rimarkoj baziĝas sur la spertoj de la sukcesa lektorato de Esperanto, gvidata jam de multaj jardekoj en la Jagiellona Universitato en Krakovo. La Universitato apartenas al la plej gravaj polaj altlernejoj. Ĝi pretendas instrui kiel eble plej vastan aron de instruobjektoj. La universitataj aŭtoritatoj opinias Esperanton unu el tiuj instruendaj objektoj. Ili aprobas ĝian instruadon, ĉar la studentoj deklaras pretecon lerni ĝin kaj pruvas la bezonon de la ekposedo de Esperanto. Ne tiel gravas la argumentado por Esperanto flanke de la pedagogo preta instrui ĝin, nek flanke de la eksteruniversitataj Esperanto-organizoj, kiel impresas la postuloj de la studentaro ema edukiĝi pri konkreta studobjekto.

En nia Universitato du apartaj institucioj okupiĝas pri lingvoinstruado. Simila strukturo koncernas preskaŭ ĉiujn grandajn polajn altlernejojn, el kiuj kelkaj posedas ankaŭ lektoratojn de Esperanto. La Filologia Fakoj edukas fakulojn – lingvistojn, dum la Studio pri Praktika Instruado de Fremdaj Lingvoj respondecas pri lingva edukado de ĉiuj nefilologiaj studentoj. La unua, krom progresiga lingvoinstruado ankaŭ gvidas lingvistikajn objektojn kaj kondukas esplorojn, dum la dua dungas lingvoinstruistojn nedevigitajn esplorlabori. La ĝenerala programo por ĉiuj studentoj antaŭvidas devigan instruadon de du lingvoj dum unuaj du studjaroj. La lektorato de Esperanto estas ligita al la Studio kiel nedeviga objekto libervole elektata de la studentoj. Aparte de Esperanto ili havas vastan elekton de nedevi-

gaj lingvoj, krom la devigaj du. Ankaŭ la studentoj de pli altaj studjaroj povas aliĝi. Intere, ke en la jarraporto de la studio Esperanto aperas en la antaŭlasta loko sur la listo de la instruobjektoj, tuj antaŭ... stenografio.

Inter la instruistaro de la Studio mankas personoj kapablaj instrui Esperanton. Same ne estas esperantistoj inter la anoj de la Filologia Fakto. Sed tio ne malhelpas la instruadon de Esperanto. Pro prestiĝaj kaŭzoj estus certe pli bone havi filologon kiel instruiston de la Internacia Lingvo. Tamen, estu kuraĝiga ekzemplo por aliaj, ke ankaŭ ne-filologo povas oficiale instrui Esperanton en Pola Esperanto-Asocio kaj la ŝtataj rajtoj de Esperanto-instruisto estis sufiĉaj por ke oni ordonis al mi gvidi la lektoraton, kvankam laŭprofesie mi estas natursciencisto. Laŭ akordo inter la Studio kaj la Zoologia Instituto, kiu dungas min, la instruhoroj estis enkadrigitaj en mian devigan horaron, tiel ke mi ne estas aparte pagata por la lektorado. Rezulte de tio Esperanto estas oficiale instruata fare de la ano de la universitata instruistaro.

Ĉiusemestre la komencon de la interfaka instruado de Esperanto anoncas skribe la Sekretariato de la Studio en diversaj institutoj. Krome la Studenta Esperanto-Rondo anoncas sur tabuloj en studentaj domoj kaj pere de interna radio. Ĉiuj antaŭaj aliĝintoj, kiuj ne daŭrigis la lernadon, ricevas persone la informon pri la ebleco eklerni denove. Multe helpas la famo kiun ĝuas inter la gestudentoj la agado de la Studenta Esperanto-Rondo kaj iliaj internaciaj kontaktoj. Ĉiufoje aliĝas kelkdeko da studentoj, kiuj sekvas kursojn po 2 horoj semajne en du grupoj: komenca kaj daŭriga. Pro la fakto, ke la kurso ne estas deviga, ĉiam okazas malkresko de la nombro de la partoprenantoj. Tion oni ne povas eviti, ĉar kaŭzoj estas diversaj: troeco da pli gravaj okupoj, malsukceso en la ĉefaj studobjektoj, personaj obstakloj kiel malsano ktp. Tamen multaj revenas en la sekvantaj studperiodoj. Tiuj kiuj malaperas, ricevas al la hejma adreso informojn pri la korespondaj kursoj gvidataj de Pola Esperanto Asocio. La lecionoj de la lektorado okazas en la propra ĉambro de la Studenta Esperanto-Rondo en unu el la studentaj domoj. Tio estas grava, ĉar la lektorado okazas malfruvespere por kontentigi diversajn horarojn, kaj la studentoj preferas okazigadon de ĝi „hejme” ol en la foraj studejoj. En la sama ĉambro troviĝas Esperanto-biblioteko, kie libroj kaj revuoj estas aplikataj. La Rondo posedas propran kabanon Esperanto-Centron en montaro, kie okazas semajnfinaj intensaj kursoj. Tie oni ankaŭ akceptas gastojn, precipe somerferie. Dum somero la eksterlandaj esperantistoj estas akceptataj en la krakova studenta domo en kadroj de Pasporta Servo. Aktiva partopreno en la movado kaj senperaj kontaktoj kun alilandanoj estas grava faktoro kiu kreas ĉe la studentoj la bezonon koni la lingvon. Tamen, ofte la kompleksa involviĝo en la movadon povas minaci la progreson de la studado. Mi ĉiam atentigas la gestudentaron, ke krom iliaj du devoj: lerni Esperanton kaj agi en la movado – la unua kaj la plej grava estas la jena: esti bona studento en sia fakto. La plimulto de la lektoratanoj tamen kapablas sukcese akordigi la tri ampleksajn devojn. Eĉ pli, mi supozas, ke la aktivado en la movado kaj interesiĝo pri Esperanto instigas ilian intelektan disvolviĝon. Sed por pruvi tion necesus fari apartan studon.

* Dum kontraŭe, oni ofte observas neglektadon de la interlingvistikaj problemoj inter la universitataj lingvistoj kaj eĉ timon okupiĝi pri tiu problemaro pro manko de kompetenco.

El Koreujo

La Espero, Julio-Aŭgusto 1982

Novajo de KLEI

KLEI (Korea Ligo des Esperanustaj Instruistoj), Korea sekcio de ILEI, eldonis sian organon „Esperanto” en junio kiel dumonata gazeto. La organo ĉefe celas disvastigon de Esperanto al instruistoj en Koreujo.

redakcio

SINTRA
atendas vin!

unika ŝanco travivi agrablajn tagojn sen trasuferi ne imageblan homamasigiĝon kiel okazas dum multaj kongresoj.

Internacia Ligo Esperantistaj Instruistoj ILEI

17a Internacia Konferenco

Sintra (Portugalujo) Hotel Tivoli - 14-22 / 7 / 1983

ILEI

LKK

Dazzini Mario
Casella Postale 22
54100 Massa (Italujo)
Telef. 0585/41756

Inĝ. Adelino Franco Simoes
Rua Dr. João Couto 6 R/C A
1500 Lisboa (Portugalujo)
Telef. 19/741359

ALIĜILO

(Bonvolu skribi klare, legeble, laŭeble tajpe aŭ preslitere)

S-ro (S-rino, F-ino)

Familia nomo Antaŭnomo

Lando Naskiĝjaro

Loĝurbo Strato n°

Samtempe aliĝas per aparta aliĝilo:

Edz(in)o infanoj

Kotizoj

Tranokto kun kompleta pensiono

unulita ĉambro 1/1/83—31/3/83
dulita ĉambro po 37.740 Port. Eskud.

persono 29.740 Port. Eskud.

Tranokto kun duopensio

unulita ĉambro 32.140 Port. Eskud.

dulita ĉambro po 24.140 Port. Eskud.

Tranokto kun nur matenmanĝo

unulita ĉambro 26.500 Port. Eskud.

dulita ĉambro po 18.540 Port. Eskud.

La samideanoj kaj simpatiantoj kiuj deziras nur aliĝi al la konferenco devas pagi 2.500 portugalajn eskudojn. La familianoj pagas la duonon, tio estas 1.250 portugalaj eskudoj.

Mi sendas la aliĝilon al L.K.K. kaj mi verŝas la kotizon, laŭ la suprenindikitaj tarifoj, por 8 kompletaj tagoj de la vespero de la 14/7/83, al bankkonto:

CAIXA GERAL DE DEPOSITOS

Agência Central da Rua do Ouro, 49

1153 LISBOA Codex (Portugal).

Konto n° 497608/620 — ILEI — 17a Internacia konferenco

aŭ per poŝt-internaciaj mandatoj al la sama adreso.

Dorse de la enpagilo menciui nepre: Familia Nomo kaj antaŭnomo — adreso — elektita kategorio. (Post la ricevo de la kompleta pago oni havigos la konfirmilon)

Atentu LKK ne certigos loĝadon al tiuj kiuj aliĝos post la 31/3/1983.

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo: Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.

Aŭstrujo: Mag. Karl Hirmann (estro de SAEI - Societo de Aŭstria Esperanto - Instruistoj) Rannachstr. 3 A - 8046 GRAZ.

Belgujo: E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal.
E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout.
M. Sondervorst, Rue du téléphone 1, B-2180 Mettel.
H. Lentzen, Feldweg 20, B-4701 Kettenes.

Brazilo: Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.

Britujo: Hilary Chapman, 7 Fairacre road, Barwell, Leicester LE 9 8HH.

Bulgarujo: Hristo Gorov, B.E.A., Hristo Botev 97, Sofio Centro.

Danujo: Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre.

Finnujo: Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.

Franco: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.

F R Germanujo: Ruff Karin, Pappelweg 22, D-315 Peine.

Grekujo: K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).

Hispanujo: Francisko Zaragoza Ruiz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante.

Hungarujo: Zsuzsa Barcsay, Ben Kp. 25/b, H-1011 Budapest.

Irano: M. Saghafian Apt 7 N. 34 24th Street. Kuj Nasr Avenue Teheran 14488

Islando: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170 Reykjavik.

Israelo: D-ro Josef Murian . p.o.k. 1289 IL 61012 TEL. AVIV.

Italujo: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, pĉk 11244548.

Japanujo: Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.

Jugoslavujo: Miodgrad Stojanović, Omladinakih Brigada 49/III/31, YU-11070 Novi Beograd.

Kolombujo: Manuel Angel M., Apartado Aéreo 60179, Medellin.

Luksemburgo: Robert Hoenerger, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.

Malto: Carmel Mallia, 89 Sanctuary str., Zabbar, Malta.

Nederlando: D. Luesken-Burger, Boerhavestraat 82, NL-7316 LH Apeldoorn.

Nordameriko: John H. Fulton, 33365 Avenue F, Yucaipa, CA-92399 USA.

Norvegujo: Elling Strand, Ekebergveien 208, Leilighet 154, Oslo 11.

Nov-Zelando: Gvenda Sutton, 21 Rama Crescent, Wellington 4.

Polujo: Stefania Pakalska, Marszalkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa.

Portugalio: Antonio Manuel Correia Coimbra, Rua Coronel Leitao 20, 1° Esq. Lisboa Marques.

Sanmarino: Marina Michelotti, via 25 marzo, 73, I-43031 Repubblica di San Marino.

Sovetujo: Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV.

Nikolaj Starodubcev, Poštrestante SU-3-340047 Doneck.

Sud-Afriko: Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1710 Florida Glen.

Svedujo: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.

Venezuelo: Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

Izolitaĵ Membroj

Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Pribram.

Ĉinujo: Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.

Germana D R: Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brüel.

Jemena PDR: Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh hospital, Khormaksar, Aden.

Kubo: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.

Malagasujo: Eugene Raveloson, B.P. 127, Antananarivo.

Singapuro: Hongi Liao, apt blk. 14,2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14.

Zairujo: Antoine-Samuel Nangu, B P 13, Lukala, Nkandu.

Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, Pappelweg' 22A, D-315 Peine, F R Germanujo.
Vicprezidanto: Anica Hurčak, Polic-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Iugoslavio.
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. Italujo.
Vicsekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.
Financoj: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

Kunlaborantaj Organizoj

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio).
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussell.
FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 42 Grande Rue, F-92310 Sevres.
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Paris.
Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko:
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine,
FR Germanujo

Membreco en I.L.E.I. (30 svedaj Kronoj jare) inkluzivas la ricevon de IPR.

abonprezo por nemembroj: 30 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj aerpŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI . Södra Rörum pl. 455. S- 242 00-Hörby. (Svedujo)
2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 —
UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro